

ZAMENHOFA EKZEMPLARO

kompilita de Rihej Nomura, 1/2

Radioprelego de Claude GACOND, SRI 1990-008-A-3, 1990.04.05.07.

Cl.- Parolas Claude GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Hodiaŭ ni turnos niajn rigardojn al ĵus aperinta tre grava libro, kies titolo estas: **ZAMENHOFA EKZEMPLARO**. Sur kvincento da grandformataj paĝoj ĝi alfabete listigas frazojn el la verkaro de la aŭtoro de esperanto. Tiu nova vortaro utile komplementas al Plena Vortaro de Esperanto, kiu jam registras zamenhofajn fraz-ekzemplojn, sed bedaŭrinde sen citi la fontojn. Per la verko **Zamenhofa Ekzemplaro** ni povas trovi la devenon de la citaĵoj. Granda progreso.

La kompilinto de tiu Zamenhofa Ekzemplaro estas la japano Rihej NOMURA. Dum 50 jaroj li laboradis super sia verko, kiun li dediĉis al sia edzino Aja NOMURA per la ĉi-sekvaj vortoj:

"Dediĉita al Aja NOMURA, mia edzino, kiu amis kaj amas Esperanton kaj neniam forgesis lerni ĝin, trovante minuton da tempo inter siaj hejmaj taskoj, kio ĉiam instigis min al la laborado super tiu ĉi verko tra la pasintaj 50 jaroj."

Antaŭ du jaroj jam aperis provizora eldono de tiu **Zamenhofa Ekzemplaro** kaj Gaston Waringhien ĝin enkondukis per tiuj pravaj vortoj:

"Japanujo ne ĉesos mirigi nin. Post la mirakla reeldono de la kompleta Zamenhofa verkaro, kiun provizis al ni Ito KANZI, jen alia samgentano lia, Rihej NOMURA, disponigas al ni utilegan laborilon. Lia "Zamenhofa Ekzemplaro" entenas principe ĉiujn vortojn, kiujn Zamenhof uzis en frazoj (tiuj, kiuj kuŝas nur en liaj vortaroj, mankas), kaj ĉiuj tiuj frazoj estas zorge referencitaj. Per tio, ĉi tiu verko diferenciĝas kaj de la simplaj "konkordancoj", ĉe kiuj oni ordinare indikas nur la trovlokojn de la vortoj, kaj de la "vortaroj", ĉe kiuj mankas ordinare la trovlokoj, sed kiuj ne limigas sin je la Zamenhofaj vortoj.

Kaj Gaston WARINGHIEN konkludas dirante: "A1 Rihej NOMURA, kiu dediĉis grandan parton de sia vivo al la kompilado de tiu ĉi verko kaj al Akira MORITA, kiu kontrolis ĉiujn referencojn kaj prenis sur sin la pezan taskon de la publikigado, mi estas feliĉa esprimi ĉi tie mian personan dankon pro la riĉigo de nia leksikologio, kaj se mi kuraĝas diri, la dankon de la tuta esperantistaro pro tiu potenca helpo al nia kolektiva progreso en la alproprigo de la "Lingvo Internacia".

Por ricevi ideon pri tiu **Zamenhofa Ekzemplaro** ni citu vort-rubrikon. Ni ekzemple prenu hazarde la vorton **frunto**. Jen la ekzemplaro, kiun ni trovas: kisi ies **frunton**, kisi iun sur la **frunton**; alpreni la buŝon al ies **frunto**; viŝi al si la **frunton**; viŝi la ŝviton de la **frunto**; la malalta **frunto** tre videble sulkiĝis; li sulkis la **frunton**; ŝi metis la **frunton** sur la interplektitajn manojn kaj fermis la okulojn; ĉirkaŭpreni per manplatoj la **frunton**; kvazaŭ unu frunto de malĝojo la tuta regno devus nun sulkiĝi; amikan **frunton** montru al la reĝo; alta, velkinta **frunto**; seriozaj **fruntoj**; ŝia **frunto** glatiĝis; tio redonis la serenecon al la **frunto**; doloro faldis ŝian **frunton** en kelke da profundaj sulkoj; sur ŝia severa **frunto** aperis kelke da moviĝantaj sulkoj; la esprimo de profunda pripenso aperadis sur la **frunto**; sub la

pala **frunto** vidiĝis profunda petego; la ordinare serena **frunto** de la virino en tiu tago estis iom nebulita; lia **frunto** kovriĝis per densaj nuboj; virino kun nubo sur la **frunto**; vian **frunton** kovris subite ia ombro de malĝojo; la **frunto** kovriĝos per tomba paleco; la ruĝo, kiu kovris ŝiajn vangojn, leviĝis sur la **frunton**; ruĝiĝi ĝis la **frunto**; ambaŭ aliras samtempe kaj kunpuŝiĝas per la **fruntoj**.

Tiu ekzemplaro kun la vorto **frunto** montras la gravecon de la esploro de Rihej NOMURA, kiu utilos al specifaj publikoj:

Al la lingvistoj kaj zamenhofologoj, kiuj interesiĝas pri la esperanto-semantiko kaj esprimaro.

Al la leksikologoj, kiuj povos pli facile doni konvenajn ekzemplojn.

Al la pedagogoj, kiuj sentas la neceson trovi ekzemplojn al la esperanto-studentoj.

Al la verkistoj, redaktoroj kaj tradukistoj, kiuj deziras fajnigi sian lingvo-konon kaj stilon per modelaj frazoj.

Al la progresantoj, kiam ili renkontas heziton koncerne al la uzo de preciza vorto. Ktp, ktp.

Mi ne dubas, ke tiu **Zamenhofa Ekzemplaro** troviĝos baldaŭ inter la bazaj verkoj plej ofte konsultataj ĉe multaj esperantistoj lingvo-respektemaj.

Rihej NOMURA, kiel liaj samlingvanoj, ne povis improvizi la studadon de la lingvo, kiel ĝenerale faras eŭropanoj, kiuj retrovas en esperanto siajn vortojn kaj ties signifaron. La azianoj devas ĉion lerni, la vortojn, ties signifojn, fraz-ekzemplojn, esprimojn. Interese raportas pri tiu strebado Rihej NOMURA mem en la antaŭparolo al sia librego:

"En la jaro 1924, en la aĝo de 17 jaroj mi eklernis Esperanton per memlernolibro. Estis feliĉe, ke la unua Esperanta libro, kiun mi hazarde trovis en librejo en la sekvanta jaro, estis "Karlo", la fame konata legolibro de Edmond PRIVAT. Per helpo de vortaro, sed sen granda malfacileco, mi komprenis la enhavon. Ĝia bela stilo min ravis, kaj tiam mi forte sentis, ke Esperanto estas vere vivanta lingvo. Sed kiam mi komencis korespondi kun alilandaj esperantistoj, mi ofte devis ŝanceliĝi pri iu vorto, ne sciante, kiel ĝin uzi, kaj trovis, ke inter legi kaj skribi estas grandega paŝo. "Vortaro de Esperanto" de KABE, la sola Esperanto-Esperanta vortaro en tiu tempo, donis al mi konsilojn, sed ĝi ankoraŭ ne estis sufiĉe kontentiga. Esperanto, kiel ajn facila ĝi estas kompare kun naciaj lingvoj, apartenas al speco tute alia ol la japana, mia gepatra lingvo, per sia gramatiko kaj per siaj vortoj devenantaj de origino al mi tute fremda. La okcidentanoj malfacile povas prezenti al si, kiel ni eksterokcidentanoj estas afliktataj pri la ĝusta uzado de iu vorto, kiel ofte ni devas cerbumi, kiun vorton elekti por esprimi nin en Esperanto. Trovante nenian solvon, ni palpe serĉas kvazaŭ en mallumo ian signon, kiu montros al ni la direkton, en kiu ni povos fari paŝojn, kaj kiel ĝojigas kaj trankviligas nin eĉ unu sola ekzemplo por duba vorto aŭ esprimo!

Nun la samlandanoj de Rihej NOMURA havos helpilon, kiu faciligos al ili la asimiladon de la lingvo. Kaj ne nur ili. Gigantan helpon alportos al ĉiuj la verkego de Rihej NOMURA. Ni ŝatus povi lin pli longe citi, sed por hodiaŭ la manko de tempo malebligas tion fari. Do la venontan semajnon ni reparolos al vi pri lia libro **Zamenhofa Ekzemplaro** de Rihej NOMURA.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude GACOND diras al vi: Ĝis reaŭdo!